



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 28/75 28 julio 1975  
Aperas ĉiusemajne

UEA - firme fidela al la neŭtraleco

Pri la inaŭguro kaj malfermo de la 60a UK

Kopenhago (pp) "La 60a Universala Kongreso de Esperanto malfermiĝas". Kun tiuj vortoj la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, d-ro Humphrey Tonkin, malfermis la 60an Universalan Esperanto-Kongreson dimanĉe, la 27an de julio, dum la solena inaŭguro, kiun ĉeestis registaraj kaj ubaj reprezentantoj kaj diplomatoj de pli ol 20 ŝtatoj.

La bonvenigan paroladon faris la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Gustav Kühlmann. Nome de la dana ministro pri kulturaj aferoj, Niels Matthiasen, parolis la ĉefo de departemento en la ministerio por kulturaj aferoj. Li diris i.a.: "La laboro por Internacia Lingvo estis motivita per altaj idealoj kunligi homojn trans landlimojn. Estus logike kaj dezirinde, se ĉiu nacio konsentus apliki lingvon apud la naciaj lingvoj. Se tiu penso estas realigebla, Esperanto estas tiu lingvo plej proksima al la revo. Tio ne ekskluzivas la eblecon trovi aliajn solvojn. Sed Esperanto montris sian vivkapablon pere de sia proksimume 80jara ekzistado. Neniu rifuzas, ke per Esperanto estas kreita kunlaboro trans la landlimoj. La kongreso mem estas atesto de tiu kunlaboro."

Krome direktis salutvortojn al la kongresanoj la vicurbestro de Frederiksberg kaj la urbestro de Kopenhago, same reprezentantino de Unesko-Komisiono en Danlando.

Ataŝeo de la greka ambasado en esperantlingva parolado invitis al la venontjara Universala Kongreso en Ateno.

Pri la kongresa ĉeftemo "La Internacia Jaro de la Virino" parolis d-rino Flora Szabó-Felső, estraranino por kongresoj kaj konferencoj de UEA.

En la dimanĉ-posttagmeza solena malfermo de la kongreso, en kiu la reprezentantoj de la landaj asocioj de UEA salutis la kongreson, la prezidanto de UEA faris la festparoladon. Ĉi-sekve ni publikigas resumon de tiu parolado, -kiun faris d-ro Humphrey Tonkin mem por la aŭskultantoj de la Pola Radio.

D-ro Humphrey tonkin diris:

"Mi fakte min demandis, kial, per kiaj rimedoj spiritaĵoj kaj fizikaj, la Esperantokulturo restis tiel vigla kaj fortika tra la jaroj. Kial nia movado neniam perdis sian celkonscion kaj sian kuraĝon.

Unu kialo estas la genia kreaĵo de d-ro Zamenhof mem, kiu komprenis ke lingvo estas pli ol simpla instrumento, simpla ilo de komunikado, aŭ pli precize, ke la komunikado mem estas afero senfine komplika kiu postulas la engaĝon ne nur de la parolorganoj sed ankaŭ de la spirito de la homo.

Dua kialo estas ĝuste la organiza strukturo de nia movado, kaj precipe la universalaj kongresoj. Niaj kongresoj kun sia longa historio, sia akumuliĝo de kunsidoj kaj renkontiĝoj, kulturaj eventoj kaj prelegoj, decidoj kaj rezolucioj kaj krizoj kaj homaj interrilatoj de

Esperanto einmal anders

lernolibro por germanlingvanoj,

eldonita de

HEROLDO de E,

nun haveblas

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

ĉe Ludwig Pickel

Libroservo 85 Nürnberg 1

Postfach 2113

prezo 9,- GM

## Parolado de d-ro Tonkin (daŭrigo)

plej komplikaj ĝis la plej simplaj kaj ĉio esprimita en unu lingvo malgraŭ la multnacieco de la eventoj. Niaj kongresoj konsistigas unu el la mirakloj de la moderna mondo kaj unu el la pruvoj pri la vivanteco de nia Esperantokulturo. La gravecon de niaj kongresoj kiel okazoj pri la realisma alfronto de niaj taskoj, la definado kaj konfirmo de niaj celoj kaj la refreŝigo kaj refortigo de niaj animoj oni ne povas tro forte emfazi.

Sed ankaŭ inter la fakoj, agado inter internaciaj organizoj kaj registaroj estas vana sen forta kaj klara kompreno de la cirkonstancoj en kiuj troviĝas niaj lingvo kaj movado. Ne konvinkos la registarojn aŭ internaciajn organizojn emociaj argumentoj bazitaj sur niaj propraj konstatoj pri la efikeco de Esperanto. Konvinkos argumentoj bazitaj sur science pruvitaj faktoj prezentitaj lerte kaj kun adekvata kompreno de politikaj kaj sociaj cirkonstancoj. Ne sufiĉas simple aserti, ke Esperanto solvos la lingvan problemon en la diplomatio aŭ en la komerco aŭ en la scienco, sed necesas efektive pruvi tion kaj pruvi tion science.

Pri unu punkto en la statuto la unuanimeco estas kompleta. Tio koncernas la neceson konservi la politikan neŭtralecon de la asocio. La centraj organoj de UEA same nun kiel ĉiam restas firme fidelaj al la neŭtraleco. Nome de la tuta estraro mi deklaras per ĉiuj fortoj je nia dispono, ke politika neŭtraleco sur kiu estas bazita la unika grupiĝo de naciaj kaj fakaj organizoj, kiuj konsistigas nian UEA, estas necesa elemento en tiu fina sukceso de nia agado, kiun ni ĉiuj sopiras. Tio estas necesa interalie ĉar sen ĝi la diversaj landaj asocioj disiĝos en diversajn politikajn tendarojn kaj la universaleco de nia asocio estos detruita.

Ni rezistos ĉiujn klopodojn ĉu de dekstre ĉu de maldekstre kiuj povos detrui la fundamenton de nia agado.

Ne pensu tamen ke ni ne kuraĝas esprimi nin pri la homaj rajtoj kiel decas kaj morale necesas tion fari. Nia nuna observo de la Internacia Jaro de la Virino estas pruvo pri tio same nia partopreno en la jardeko kontraŭ Rasismo kaj Rasa Diskriminacio same nia aktiva interesiĝo pri lingva diskriminacio. Sed tiujn aktivecojn ni devas kompreni en la kunteksto de politika neŭtraleco sen rilatado al tiu aŭ alia politika reĝimo.

Sed ni revenas konstante al la demando pri prioritatoj. Malfacile oni povas malkonsenti kun la enhavo de nia tria baza laborplano. Malgraŭ la multaj bonaj ideoj tie, ĝi efektive enhavas preskaŭ ĉion kaj ĉio ne estas aranĝita ĝuste en prioritatoj. Sed tiun laborplanon ni devas rilatigi al niaj rimedoj kaj al la fina venko de la lingvo.

Ne estas laŭmode paroli pri tiu fina venko. Ni emas perdiĝi en la taktiko de la momento kaj forgesi pri la pli vasta strategio. Se ni vere kredas ke la malgranda aŭ la relative malgranda Esperanto-movado estas nur paŝoŝtono al universala utiligo de Esperanto por la internacia komunikado necesas foje pripensi la formon de tiu universala utiligo.

Kiel ni atingu tiun universalecon? Kiel ni gvidu nian agadon en monda kadro sen perdi la dinamismon kaj energion de la nuntempa malgranda skalo de nia aktiveco.

Ni venis al vojkruciĝo, se mi rajtas ŝanĝi la metaforon en kiu

### Parolado de d-ro Tonkin (daŭrigo)

ni devas rekonfirmi kaj rekoncepti niajn celojn. Tiun vastan rigardon al nia problemaro la estraro de UEA iniciatos per pluraj vojoj. Mi mem intencas proponi al la estraro kaj komitato du grandajn iniciatojn tiucele:

Unue mi proponos, ke UEA kunvoku en 1976 aŭ 1977 internacian konferencon pri la estonta vojo de la Esperantomovado, ĝiaj formoj, prioritatoj kaj direktoj.

Due mi proponos la kreon de Konsilantaro de eminentuloj el ĉiuj faktoj, grupo ĉefe sed ne ekskluzive esperantista kiu helpu nin eldefini tiujn venontajn prioritatojn, per kontribuo de siaj konsiloj kaj talentoj kaj kiu malfermu al ni iagrade la vastan publikan mondon ekster nia propra celo."

### Salutvortoj al la UK

#### Saluto de la Alta Protektanto

Estas granda ĝojo por mi bonvenigi la partoprenantojn de la Kongreso al Kopenhago, kaj estas honoro por Danlando kaj nia ĉefurbo, ke la esperantistoj okazigas sian 60-an Universalan Kongreson ĉi tie.

Ni ĉiuj sentas, ke ni en la hodiaŭa mondo staras antaŭ grandaj problemoj, kiuj nur komune povas esti solvataj.

Sed antaŭ ol ni povas esperi atingi ion, estas certe necese, ke ni povu komunikiĝi unu kun la aliaj kaj tiel rompi tiun izolitecon, kiun lingva baro povas kaŭzi.

Mi deziras, ke la Kongreso kontribuu al la reciproka kompreno kaj scio de la popoloj kaj tiel plenumu la fundamentan celon de la Esperanto-movado.

Anker Jørgensen

Ĉefministro de Danlando

### Mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO

Desirante daŭrigi kaj intensigi sian lukton kontraŭ ĉiuj formoj de malegaleco kaj diskriminacio, kaj konsciante pri la kontribuo, kiun la virinoj povas alporti al la progreso kaj harmonia evoluo de la socio, Unesko bonvenigas ĉiujn iniciatojn faritajn en la sfero de ĝia kompetento por helpi la progresigon de la virinaj rajtoj.

Tial mi estas feliĉa, ke la organizantoj de la 60-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉefan temon de ĉi tiu manifestacio la rolon de la virino en la socio. Per la kontribuo, kiun ili celas tiamaniere fari al la celebrado de la Internacia Jaro de la Virino - proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj -, la esperantistoj povos daŭrigi sur esence grava kampo la laboron, kiun ili entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj.

Kun aparta fervoro, do, mi direktas al ĉiuj partoprenantoj miajn plej varmajn bondezirojn por la sukceso de iliaj laboroj.

Amadou-Mahtar M'Bow

Ĝenerala Direktoro de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por la Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO)

## Pliaj novaĵoj pri la UK

### El la dana gazetaro

La gravaj danaj ĵurnaloj "Berlinske Tidende" kaj "Politiken" en siaj eldonoj de la 28 julio raportas pri la kongreso.

"Berlinske Tidende" prezentas sub la rubriko "Navne og dage" la LKK-prezidanton Gustav Kühlmann per bildo kaj ampleksa teksto. Sur paĝo 3 la sama ĵurnalo raportas pri internacia Esperanto-geedziĝo en Kopenhago kun la surskribo "Esperanto-bryllup". Geedziĝis Michel Audibert, Parizo, kaj la japanino Kazuo Sagawara; la eklezian ceremonion plenumis pastro Ludwig Thalmeier, Landshut.

Pri la sama internacia geedziĝo, same kun foto, ankaŭ raportis la ĵurnalo "Politiken". Sur la foto videbliĝas la geedza paro kaj pastro Ludwig Thalmeier. "Politiken" raportas ankaŭ pri la kongresa inaŭguro.

### Radio Kopenhago

Dum la kongreso la loka radio-stacio Kopenhago, dua programo je la ondolongo 96,5 metroj, ĉiutage elsendas en Esperanto la plej freŝajn internaciajn novaĵojn por la kongresanoj je la 8,10 h. Tiu elsendo estas ankaŭ anoncita en la radioprogramo. En "Berlinske Tidende" ekzemple oni povas legi: 8,10 Hav, luft - programoversigt. Nyheder på Esperanto. (I anledning af verdenskongressen i København).

### Esperanto en la Radio

Kiel anoncite Radio Varsovio dimanĉe vespere kaj lunde matene rekte raportis per kablo el Kopenhago. Dank' al tiu raportaĵo Pilo-Press povis jam nun aktuale raporti pri la kongreso. Bedaŭrinde pro teknikaj malfacilaĵoj la kablaĵo ne estis perfekta, sed Jerzy Grum faris sian eblon. Lunde posttagmeze Varsovio parte ripetis la prikongresan elsendon.

Ankaŭ Romo kaj Vieno rilatis al la UK en Kopenhago. Subbaze de la kongresa libro Romo felietonis pri la kongreso kaj Vieno mallonge recenzis la kongresan libron. Cetero dum unu semajno Radio Romo ricevis 50 korespondaĵojn. Vieno ĉi-foje ankaŭ sabate vespere estis bonege aŭdebla. Ankaŭ la kultura programo de Vieno rilatis al la kongresa lando: La dana poeto Oehlenschläger en Vieno.

Antaŭanonco: la 2/3 de aŭgusto Vieno raportos pri Thorvaldsen kaj lia rilato al Vieno.

Berno: Ges-roj Gacond parolis pri la ekuzo de la suna energio kaj ĉ-ro A. Baur rakontis en interesokapta maniero pri Baden kaj ĝiaj enloĝantoj, kiuj scipovas fari festojn: Vera inflacio de jubileo! Venontsemajne ĉ-ro A. Baur parolos pri "Arbaro, ĉasado kaj fiŝkaptado".

Pilo-Press atentigas ke Radio Varsovio denove raportos pri la UK merkrede vespere kun ripeto jaŭde matene kaj sabate, je la 2a de aŭgusto. Cetero, Varsovio ricevis ĝis la 24a de julio 2 788 leterojn kaj poŝtkartojn. Oni supezas, ke ĝis meze de aŭgusto alvenos la 3 021a letero. Tiu korespondaĵo fariĝos jubilea kaj laŭ propono de A. Pettyn oni antaŭvidas premion por tiu aŭskultanto, de kiu venos tiu korespondaĵo. La jubilea kaŭzo estas la fakto, ke ĝuste 3 021 korespondaĵoj eniris dum la jaro 1974. Kaj 1975 oni atingis tiun nombron jam dum aŭgusto!

\*\*\*\*\*

### Esperanto einmal anders

(Esperanto foje alimaniere)

Germanlingva versio de la lernolibro de W. Auld

Esperanto: a new approach, prilaborita de R. Hauptenthal  
prezo 9,- DM